

Anne Morelli

**ELEMENTAJ  
PRINCIPOJ  
DE MILITA  
PROPAGANDO**

uzeblaj dum malvarma, varma aŭ varmeta milito...

Elementaj principoj de milita propagando

Originala eldono: *Principes élémentaires de propagande de guerre. Utilisables en cas de guerre froide, chaude ou tiède...*

Éditions Aden, 2022 - ISBN 978-2-805901-06-5

[www.aden.be](http://www.aden.be)

Tradukis: Jean-Claude Thumerelle

Kontrolis: Klaus Friese, Xavier Godivier, Goro Christoph Kimura, Éric Nemes,  
Thierry Tailhades, Pascal Vilain

Enpaĝigis: Emmanuelle Richard

Kovrilpaĝo laŭ desegno de andrydj/ freepik.com

Eldonita de Esperanto-France, kun la permeso de Anne Morelli

Presita de lulu.com

Leĝa depono: februaro 2024

© 2024 Esperanto-France. Ĉiuj rajtoj rezervitaj en ĉiuj landoj kaj ĉiuj lingvoj.  
Publikigo aŭ traduko, parte aŭ tute, eblas nur post skriba permeso de la eldonisto. Ne ŝtelkopiu ĉi tiun libron, aĉetu ĝin, la profito iras al la asocio Esperanto-France, kiu helpas disvastigi Esperanton.

ISBN : 978-2-494261-00-6

Dépôt légal : février 2024

Esperanto-France

4 bis rue de la Cerisaie

75004 Paris

France

<https://esperanto-france.org/>

# Enhavo

Antaŭparolo .....	5
Dankon Lord Ponsonby! .....	6
1. Ni ne deziras militon.....	9
2. Nur la alia flanko respondecas pri la milito.....	14
3. La malamiko havas la vizaĝon de la diablo (aŭ “La terura deĵoranto”) .....	27
4. Noblan kaŭzon ni defendas kaj ne proprajn interesojn .....	36
5. La malamiko konscie provokas kruelaĵojn; kiam ni faras misagojn, estas nevole. ....	50
6. La malamiko uzas malpermesitajn armilojn .....	65
7. Ni suferas malmulte da pereoj, tiuj de la malamiko estas egaj.....	76
8. La artistoj kaj intelektuloj subtenas nian kaŭzon.....	81
9. Nia kaŭzo havas sanktan karakteron .....	94
10. Tiuj kiuj esprimas dubon pri la propagando estas perfiduloj.....	100
De Lord Ponsonby ĝis Jamie Shea .....	111
Notoj .....	117

## Antaŭparolo

Kial tiu traduko?

Dum la jaro 2022 okazis en Mons (Belgio) rimarkinda ekspozicio kies titolo estis: Rezisti al la militpropagando (dek elementaj principoj).

Ĉar la prezentitaj dokumentoj de la ekspozicio estis kreitaj laŭ la plano kaj la fundamentaj elementoj, kiujn entenas la verko de Anne Morelli, mi malkovris ĝin tiaokaze, kvankam ĝi estis eldonita ekde 2010.

En la librovendejo de Mundaneum, kultura centro kiu organizis la ekspozicion, mi povis aĉeti la libron kaj mi tuj komprenis post ĝia legado, ke tiu verko devas trovi lokon en la listo de la verkoj publikigitaj esperante.

Ĉar la pacista idealo estas ĉefa fundamento de Esperanto, mi pensis ke la informoj kaj pripensoj de la aŭtorino, kiuj restas tre aktualaj, povas esti tre utilaj por la esperantista komunumo.

Pro tio mi decidis traduki la libron kaj mi esperas ke multaj esperantoparolantoj trovos saman intereson en ĝia legado.

Jean-Claude Thumerelle

Mi kore dankas Klaus kaj Éric por iliaj relegoj, konsiloj, rimarkoj, kiuj multe helpis min.

## Dankon Lord Ponsonby!

Kiam la Libera Universitato de Bruselo konfidis al mi la kurson de historia kritiko, profesoro Stengers nepre konsilis al mi du verkojn kiel referencajn librojn kaj pilierojn de tiu kurso.

La unua estis la libro de Jean Norton Cru pri la atestoj, kiuj kontraŭstaris multnombrajn ideojn pri la vereco de la rakontoj de la atestantoj dum milita periodo<sup>1</sup>.

La dua estis la perpleksiganta verko de Arthur Ponsonby eldonita en Londono en 1928 kies titolo estas *Falsehood in Wartime*<sup>2</sup>.

La verkisto estas si mem fascina persono pri kiu necesas interesiĝi dum iom da tempo ĉar el lia stimulantata pripensado pri la milita propagando dum la Unua Mondmilito naskiĝis, preskaŭ unu jarcento poste, tiu ĉi malgranda verko.

Arthur Ponsonby (1871-1946) originas el unu inter la plej eminentaj britaj familioj. Efektive tiu barono eĉ naskiĝis en la kastelo Windsor, ĉar lia patro estis neniu alia ol la privata sekretario de la reĝino Viktoria.

Post studoj en Eton kaj Oxford – tiel estas necese en tiu medio – li eniris en la britan diplomation, kaj poste, kiel membro de la Liberala Partio (tio estis jam aŭdaca!) en la Ĉambro de komunuloj.

Li kontraŭstaris la eniron en militon de Britio en 1914 kaj aliĝis (tio estas ankoraŭ malpli ordinara por aristokrato de tiu epoko!) al la Laborista Partio.

Li estis la reprezentanto de la partio en la Ĉambro de komunuloj kaj poste en la Ĉambro de lordoj.

Li kunlaboris kun la laboristaj registaroj kaj iĝis interalie ŝtata subsekretario pri eksterlandaj aferoj kaj ministro pri transportoj.

Kiam, en 1940, la Laborista Partio aliĝis al la Sankta Unio\*, Arthur Ponsonby, fidela je siaj pacistaj konvinkoj, rompis kun ĝi.

En Oktobro 1914 li fondis, kun tre famaj anglaj liberaluloj (Norman Angell, Edmund D. Morel kaj Trevelyan) kaj la gvidanto de la Laborista Partio Ramsay Mac-Donald, la *Union of Democratic Control* (UDC: Unio por Demokratia Kontrolo). Ĝia celo estis kontroli konstante kaj publike la eksteran politikon de Britio. Malgraŭ la persekutoj kontraŭ ĝiaj membroj<sup>3</sup>, la Unio publikigis dum kaj post la Granda Milito pamfletojn luktantajn kontraŭ la oficiala propagando de la brita registaro. Ĝi plivastigis sian agadon eksterlande, interalie per la monata revuo *Foreign Affairs*, kiu havis kiel subtitolon *A Journal of International Understanding*.

En Francio UDC, de kiu Arthur Ponsonby estis unu el la fondintoj, havis inter siaj kunlaborantoj la Studsocieton pri la milito kaj la Union popolan por la paco kaj ĝi patronis la eldonadon de la verko de Georges Demartial kies titolo estis *Comment on mobilisa les consciences*<sup>4</sup>.

Arthur Ponsonby<sup>5</sup> estis pacisto kaj evidente ne neis, ke la milito estas la okazo de multnombraj kruelaĵoj, de perfortaj agadoj kaj barbaraĵoj, sed, en sia libro, li celis malkonstrui plurajn mensogojn inventitajn kaj disvastigitajn dum la Unua Mondmilito por inspiri, al la diversaj loĝantaroj koncernataj, indignon, teruron kaj malamegon, por eksciti la popolajn fervorojn kaj, rilate Brition kie la milita servo ne estis deviga, ebligi la dungadon de volontuloj laŭ sufiĉa nombro.

Li priskribis mensogojn konigitajn en Usono kaj en Italio, sed ĉefe tiujn, kiujn li povis analizi dank' al sia pozicio en Britio, kie la oficiala oficejo de propagando estis prizorgata de Lord Northcliffe.

---

\* Nomo donita al la politika movado, kiu kunigis la francojn de ĉiuj politikaj aŭ religiaj tendencoj je la komenco de la Unua Mondmilito. (Noto de la tradukinto)

Arthur Ponsonby priskribis tiamaniere kelkajn esencajn mekanismojn de la milita propagando, kiujn oni povas resumi en dek “ordonoj”.

Tiujn dek “ordonojn” mi sistemigis en dek ĉapitroj, kiuj estigas la kanvason de tiu libro. Por ĉiu de tiuj esencaj principoj de la milita propagando, mi strebis demonstri, ke ili evidente ĉeestis ne nur en la Unua Mondmilito kaj ke, ekde tiu tempo, ili estas uzataj regule de la partoprenantoj, dum konfliktoj eĉ inter la pli freŝdataj.

Mi ne provos inspekti la ĝustecon de iuj aŭ aliaj. Mi ne intencas scii, kiu mensogas kaj kiu esprimas veraĵon, kiu estas sincera aŭ malsincera. Mia sola celo estas ilustru la principojn de la propagando ĝenerale uzatajn kaj priskribi iliajn mekanismojn.

Kaj se la demonstro estas pli facila por la “varmaj” militoj, la “malvarmaj” aŭ “malvarmetaj” ne rezignas ankaŭ uzi la maljunajn principojn de Ponsonby, tiom oportunajn kaj efikajn.

## 1. Ni ne deziras militon

Arthur Ponsonby jam rimarkis, ke la politikaj estraroj de ĉiuj landoj, almenaŭ en la moderna historio, antaŭ militdeklaro aŭ eĉ dum la momento fari tiun deklaron, ĉiam solene certigis antaŭe, ke ili ne deziras la militon.

Efektive milito kaj ĝiaj sekvantaj teruraĵoj estas malofte popularaj apriore kaj do estas bonmaniera sinteno prezenti sin kiel pacamanto.

En 1914, la franca registaro mobilizis proklamante, ke mobilizado ne estas milito sed, male, la plej bona rimedo por certigi pacon.

La 19-an de Aŭgusto 1915, la germana kanceliero certigis al Reichstag: *Ni ne deziris la militon. De la kreado de la imperio, ĉiu jaro en paco donis al ni gajnon: en la paco ni prosperis.*

Dum la Konferenco de Vaŝingtono novembre 1921 pri la redukto de la armiloj, Aristide Briand, amnezia rilate la francajn koloniajn militojn, pri tiuj de Napoleono aŭ de Ludoviko la 14-a kaj rilate la francajn postulojn en Versajlo, senĝene certigis: dum ĝia historio neniam la franca popolo estis imperiista aŭ militista, neniam ankaŭ venkinta popolo estis aginta kun la modereco de Francio.

La Dua Mondmilito ne estas escepto al tiu regulo kaj, se ni ne estas surprizitaj ke niaj aliancanoj deklaris sin inklinaj al la paco, ni malkovras kun stuporo la saman inklinon por la Akso-potencoj.

Estas tre instrue, por ekzempli, vidi la kinematografajn novaĵojn proponitajn en Usono kaj Japanio kiam tiuj du landoj komencis militi en Decembro 1941. Ĉar la generalo Tōjō kaj la prezidanto Roosevelt en tiu cirkonstanco faris paroladon per preskaŭ la samaj vortoj. Ili prezentis sin kiel pacistojn kaj kontraŭstarantojn al la milito.



Estas ofta temo en la paroladoj de Franklin Roosevelt. Oni denove trovas ĝin la 16-an de Majo kaj la 10-an de Julio 1940 en lia mesaĝo al Kongreso, en kiu li petis enormajn kreditojn por ekprepari armeon de pli granda amplekso kaj pli bone organizita, kaj kie li asertis: *Ne nur ĉiu usona civitano sed ankaŭ ĉiu registaro en la mondo scias, ke ni kontraŭstaras militi. Ni ne uzos armilojn en agresa milito; ni ne sendos niajn soldatojn partopreni militojn en Eŭropo. Sed ni forpelos la agreson kontraŭ Usono aŭ okcidenta hemisfero*<sup>6</sup>.

Sed Hitler, la marŝalo Göring kaj von Ribbentrop ne malsimile parolis en 1939, nek aliparte la prezidanto de la franca Konsilio Édouard Daladier, kiu, sincere sendube, provis forpuŝi la militon...

Se oni konsultas, dum la periodo ĵus antaŭ la Dua Mondmilito, la diplomatajn dokumentojn eldonitajn de la franca registaro<sup>7</sup>, la malakordaj ekzemploj de tiuj “deziroj de paco” abundas.

Jam en 1936, en la interkonsento aŭstra-germana subskribita de la Reich-estraroj kaj de la Federacia ŝtato de Aŭstrio, tiuj deklaris ŝanĝi siajn rilatojn *kun la konvinko alporti multvaloran kontribuon en la ĝenerala evoluo de Eŭropo por konservi la pacon*.

Dum la krizo, kiu finiĝis per la dispartigo de Ĉeĥoslovakio, Hitler deklaris en sia parolado en la Sportopalaco de Berlino, la 26-an de Septembro 1938, pri sia renkonto kun Chamberlain: *mi certigis lin ke la germana popolo nenion alian ol pacon deziras; sed mi ankaŭ deklaris, ke mi ne povas pli foren puŝi la limojn de nia pacienco*.

En la sama parolado – unu jaron antaŭ la invado de Pollando – li citis la germanan-polan interkonsenton kiel modelon: *Ni ĉiuj estas konvinkitaj, ke tiu interkonsento alportos daŭran pacigon. Ni konscias, ke estas du popoloj, kiuj devas vivi unu apud la alia. La decida elemento estas ke la du registaroj kaj ĉiuj homoj saĝaj kaj klarvidaj de la du landoj tenu la deziron senĉese plibonigi siajn rilatojn*.

Tiu “volo de paco” estas vere unu el la senĉesaj ripetoj en la Führer-deklaroj.

Al la ambasadoro de Francio en Berlino li deklaris, pri la rilatoj inter Francio kaj Germanio: *pri tiuj rilatoj mi deziras, ke ili estu pacaj kaj bonaj, kaj mi ne vidas kaŭzojn por ke ili ne estu tiaj. Neniu motivo de konflikto ekzistas inter Germanio kaj Francio*<sup>8</sup>.

La 15-an de Marto 1939, la interkonsento subskribita de Hitler kaj de la prezidanto de la ĉeĥoslovaka ŝtato, D-ro Emil Hácha, kiu ĉesigas la ekziston de Ĉeĥoslovakio, komenciĝas per la esprimo *de la konvinko ke la celo de ĉiuj streboj devas certigi la trankvilon, la ordon kaj la pacon en tiu parto de centra Eŭropo*<sup>9</sup>.

Von Ribbentrop, aludante la rilatojn inter Germanio kaj Pollando, deklaris al Monsinjoro Tiso, ĉefo de slovaka registaro: la Führer ne deziras militon. Li decidis ĝin nur kontraŭ sia volo<sup>10</sup>. Ankaŭ Göring, alparolante al la laboristoj de Rheinmetall en la komenco de Aŭgusto 1939, volis certigi al ili, ke la Reich ne deziris la militon, ke li atendis, serena kaj plena de konfido al la Führer, la pacon kiun li deziris, sed ke li defendus sin se oni malpermesus tiun pacon aŭ se iu stulte agus por dronigi Eŭropon en milito<sup>11</sup>.

Hitler, skribante al la prezidanto de la franca Konsilio de la ministroj Édouard Daladier la 27-an de Aŭgusto 1939, certigis al li sian pacodeziron per vortoj preskaŭ kortuŝantaj se oni ne sciis la perforton de liaj realaj projektoj, delonge jam ellaboritaj: *Kiel eksbatalanto, mi konas kiel vi la teruron de la milito. Pro tiu mensa sinteno kaj pro tiu sperto mi ankaŭ provis fidele nuligi ĉiun kaŭzon de konflikto inter niaj du popoloj.*

Li certigis, ke li rezignis pri Alzaco kaj Loreno: *Per tia rezigno kaj per tia konduto, mi pensis ke mi nuligis ĉiun elementon de malpaco inter niaj du popoloj kiu kapablas konduki al la ripeto de la tragedio de 1914-1918 [...] Mi rezignis pri Alzaco por preventi novan sangoverŝon.*

Samtempe Hitler skribis ankaŭ al la brita registaro por ĝin konvinki pri siaj pacaj intencoj. Ankoraŭfoje li asertis, ke *la Reich-registaro sincere deziras akordon, kunlaboron kaj anglan-germanan amikecon.*

Kiam li kunvokis la Reichstag, la 1-an de Septembro 1939, por sciigi la invadon de Pollando, Hitler nepre certigis siajn pacajn sentojn kaj siajn klopodojn por konservi la pacon: *Mi ĉiam provis obteni la revizion de tiu situacio per pacaj rimedoj. Estas mensogo pretendi ke ni ĉiam uzas perforton. En ĉiu situacio, ne nur unufoje sed plurfoje, mi provis obteni la neprajn ŝanĝojn laŭ la traktada vojo. [...] Vane mi provis solvi la problemojn rilate Aŭstrion, Sudetojn, Bohemion kaj Moravion [...] Mi deziras, ke en la rilatoj inter Germanio kaj Pollando, okazu plensanĝo, kiu ebligas pacan kunlaboron de la du popoloj.*

Estas evidente paralela prezento – sed ĝi malpli surprizas nin – en nia flanko.

En interparolado de la 15-a de Aŭgusto 1939, la ambasadoro de Francio en Berlino pentris al la germana ŝtatossekretario pri eksterlandaj aferoj bildon de Francio ĵus antaŭ la “stranga milito”, *kiel laborema, kvieta kaj paca, sed decida al ĉiuj oferoj por la defendo de sia honoro kaj de sia statuto en la mondo.*

La 2-an de Septembro 1939, sciigante al la Ĉambro de Deputitoj la ekmiliton, Édouard Daladier uzis denove tiun temon kaj – forgesante la kolonian pasintecon de Francio – ekkriis: *Ne estas la francoj, kiuj levigis por invadi teritorion de fremda lando. Lia “Voko al la Nacio” de la 3-a de Septembro havis ankaŭ kiel centran punkton la certigon de sia pacodeziro: Mi konscias, diris en tiu kunteksto la prezidanto de la Konsilio, ke mi laboris sen paŭzo kaj ripozo kontraŭ la milito ĝis la lasta minuto*<sup>12</sup>.

Saman pacistan volon esprimis freŝdataj deklaroj. Kiam, en Oktobro 2019, la turka prezidanto Recep Tayyip Erdoğan sendis sian armeon al nordo de Sirio, por ke ĝi provu senkapabligi la kurdojn de la armita branĉo de la Partio de la Demokrata Unio, Ankaro baptis tiun militan operacon “Fonto de Paco”.

Oni retrovas la saman amon por paco en la diraĵoj de Donald Trump. En Januaro 2020, la usona prezidanto ordonis misilan pafon, kiu mortigis la irananojn generalon Qassem vizitanton Bagdadon.

La irana reago estis vigla: 22 misiloj estis pafitaj al la usonaj bazoj de la regiono. Trump tamen prezentis sian strategion kiel “Planon por paco en Proksima Oriento” kaj la ĵurnalo *Le Figaro* titolis artikolon: “Irano mobilizas kontraŭ la planon por paco de Donald Trump<sup>13</sup>.”

Eĉ la milita alianco de NATO, kiu bombis dum tri monatoj Jugoslavion – kiu neniun membron minacis – kaj atakis Irakon, proklamis, ke ĝia celo estas garantii daŭran pacon.

Se ĉiuj ŝtatestroj kaj registarestroj havas similan pacovolon, oni povas evidente demandi sin naive kial, kelkfoje (kaj eĉ ofte) malgraŭ tio komenciĝas militoj?

Sed la dua principo de la milita propagando tuj respondas al tiu rimarko: ni estis **truditaj** militi, la **adversa** flanko komencis, ni estas **devigitaj** reagi, pro **legitima defendo** aŭ por respekti niajn internaciajn **interkonsentojn**...